

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №8-9



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №8-9 (286-287)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 69-70.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №8-9 (286-287).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 3 сентября 2018 г.

© La Ondo de Esperanto, 2018

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Temo 5

Jukka Pietiläinen. La unua UK en Portugalio	6
Audrey Azoulay. Salutmesaĝo de Unesko al la partoprenantoj de la 103a UK ...	9
Rezolucio de 103a Universala Kongreso de Esperanto	10

Intervjuo..... 11

Mark Fettes. Mi restos aktiva en la movado	12
--	----

Eventoj 20

Ángel Arquillos. Hispana Kongreso, la unua el la kvar sinsekvaj	21
Volodimir Hordijenko. Lviv, mirinda kaj vizitinda	22
Mireille Grosjean. ILEI vivas kaj progresas	23
Gary Mickel. SAT-anoj ekfrontas la defion de novaj komunikaj teknologioj ...	24
Jorge Rafael (Rafa) Nogueras. NASK 2018: Rekorde granda ĉeestantaro	26
Russ Williams. SES 2018 denove bonega	28
HaGo, AIKo. NDK: Prezento kaj kvizo en Slovakio	30
HaGo, AIKo. NDK en la ĉefurbo de Hungario	31
Povilas Jegorovas. Litovio: Migranta ekspozicio	31
Horst Vogt. OSIEK: Esperanto en artoj	32
Angel Sotirov. LIBE: Medvednica – nia ĉi-jara Esperantio	33
Oldřich Arnošt Fischer. Ekumene kaj Esperanto en Ĉeĥio	34
Tõnu Hirsik. BET-54	35
Valentin Melnikov. RET: Bona ripozo por nur 35 personoj	36
Pavol Kaščák. “Teo kaj Amo”: Ĉinaj diplomoj por Ĉeĥio	37
Srećko Radulović. Jubilea boatado en Kroatio	38
Du novaj membroj de la Honora Patrona Komitato	39
Premio Deguĉi 2018 al Katalin Kováts	41
Tobiasz Kaźmierski. Arkones-34: Sen Paweł, tamen antaŭen	42
La 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj	43
Peter Baláž. KAEST 2018: Pri scienco en Esperanto	45
Ralph Glomp. Esperanto-Instruado Semajnfino kun Zsófia Kóródy	46
Koncize (11 informoj)	47

Tribuno 48

50 jaroj da elstara agado: honorigo de ESF	49
--	----

Amri Wandel. Premio Pirlot denove	50
Giorgio Silfer. La israela kazo kaj "lingva demokratio"	51

Arkivo 52

Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en septembro 2018	53
Pavla Dvořáková. Francisko Valdomiro Lorenz omaĝita en sia patrujo	54

Kulturo 56

Miguel Gutiérrez Adúriz. Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2018...	57
Gerrit Berveling. Brulvunde (Recenzo: Jorge Camacho. <i>Brulvunde</i>)	58
Eugène de Zilah. Nia diligenta kolegaro.....	60
Flo! Du muzikaj novaĵoj	63
Unesko-Kuriero, 2018, №3.....	64
Literatura Foiro, 2018, №293	65
Ricevitaj gazetoj	65
Premioj de Fondaĵo Antoni Grabowski	66
Nekrologo	66

Mozaiko 67

István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....	68
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	69

Sur la kovropaĝo estas fragmento (centro) de la komuna foto de ĉi-jara SES. Diversaĝaj, diverslandaj, diversnivelaj lingve, sed venintaj al la sama loko por komune studi, kleriĝi, kulturiĝi kaj amuziĝi. (Foto: Peter Rybín)

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>



Ĉi-somere Portugalio unuafoje gastigis la Universalan Kongreson de Esperanto. Pri la 103a UK, kiu logis al Lisbono 1567 kongresanojn el 73 landoj, raportas Jukka Pietiläinen, kiu per ĉi tiu artikolo finas (ĉu nur por unu jaro?) sian longan prikongresan verkadon, ja sekvajare li estos inter la organizantoj de la 104a UK en Lahtio. (Foto: Anna Striganova)

La unua UK en Portugalio

103a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, la 28an de julio – la 4an de aŭgusto 2018

Antaŭ la kongreso multaj eŭropanoj eble timis la Sud-Eŭropan varmegon, tamen la unuaj tagoj de la kongreso estis en Lisbono pli malvarmaj ol en multaj Eŭropaj landoj, inkluzive de norda Eŭropo. Tamen la ekskursita tago kaj la finaj tagoj de la kongreso ofertis kutiman sudan varmegon de pli ol 40 gradoj. La kongresejo estis eble milde klimatizita, tamen eble ne, ĉar la pordoj de kelkaj salonoj estis malfermitaj eksteren dum la programeroj. La flughaveno de Lisbono situas konvene proksime de la urbocentro, sed la alia flanko de tiu konveneco aŭdeblis kongreseje, ĉar la aviadiloj flugis alteriĝe ĝuste super ĝi, ofte je nur kelkminuta intervalo.

La kongresejo estis universitato, kiu parte konvenis, parte ne. La salonoj estis konvenaj por prelegoj, kaj la festosalonoj por artaj programeroj, nur la movada foiro estis lokita en tro ŝtopita koridoro. Tamen la inaŭguro kaj nacia vespero okazis en urbocentra teatro sufiĉe malproksime de la kongresejo. Fadu, la portugala kanto-stilo, kaj la tradiciaj dancoj estis la ĉefa parto de la nacia vespero. Eble iom limigita rigardo al la portugala kulturo, tamen sufiĉe spektakleca.

La malmultekostaj pladoj de universitata manĝejo estis ofertitaj ankaŭ al kongresanoj kaj la tuta manĝo kun deserto ktp kostis nur 2,5 eŭrojn, sed la rezulto estis ankaŭ longaj vicoj dum la lunĉotempo. Mi emis stari en tiu vico nur dufoje dum la semajno. Tamen la vico por malgrandaj manĝetoj kaj trinkaĵoj estis feliĉe malpli longa, kaj eta biero kostis nur 80 cendojn. Eblis sidi ankaŭ ekstere, kie troveblis ombraj lokoj ĉar la rekta suno estis simple troa.

La Komitato de UEA havis eksterordinare multajn kaj longajn kunsidojn, kvankam ili ne ĉiam komenciĝis je la anoncita tempo, ĉar la gardistoj de la rektorejo, kie okazis la komitataj kunsidoj, ne permesis eniri la konstruaĵon. Nova ordono al ili venis nur 10 minutojn post la anoncita komenco kaj la kunsido povis komenciĝi je 20 minuta malfruo. La Komitato elektis unu novan komitatanon C, kiu fariĝis Rakoen Maertens, kaj novan estraranon Fernando Maia. Al estrara posteno sopiris eĉ ses kandidatoj (el kiuj unu, Michaela Lipari, forfalis ĉar ŝi ne elektiĝis al la Komitato) kaj necesis du voĉdonadoj, ĉar en la unua neniuj ricevis pli ol duonon da voĉoj.

Krome, tute sen diskuto okazis nuligo de la Jarlibro de UEA, almenaŭ por la venonta jaro, ĉar en la akceptita buĝeto ne estas mono por eldoni ĝin. La longe atendata nova retejo espereble solvos ĉion, almenaŭ tiun impreson eblis ricevi per aŭskultado de gravulaj paroloj pri ĝi. Nur malmultajn saĝajn parolojn eblis aŭdi pri tio, ke eble la retejo kaj nuligo de paperaj eldonaĵoj ne solvas ĉion. Se iam antaŭ



En la nacia vespero (Foto el la Fejsbuka paĝo de So Jinsu)

deko da jaroj aŭ pli, kritikoj kontraŭ la Centra Oficejo kaj Estraro estis pli akraj, nun forta kritiko tute mankas. Ĉu ne plu videblas alternativa politiko por finance malekvilibra UEA? Apud la nova retejo alia savoringo ŝajnas esti la volontuloj aŭ robotoj, kiuj laŭ kelkaj komentoj povus solvi la problemojn. La planita defikto en la buĝeto de UEA estos granda ankaŭ venontjare, sed la Komitato eĉ pligrandigis ĝin per malaltigo de kotizoj kaj per pligrandigo de diferenco de kotizoj laŭ vivnivelo de landoj. Espereble la loĝantoj en malriĉaj landoj nun amase aliĝos al UEA por porti almenaŭ iom da enspezoj, kaj espereble la kostoj pro membroj, kiuj pagas nur du-eŭran jarkotizon ne estos pli altaj ol tiu kotizo. Se okazos alie, mi kredas ke la venonta jaro portos novajn ŝanĝojn al la kotiz-sistemo kaj fortan kritikon kontraŭ la ekziĝonta Estraro. Ĉi-foje ankaŭ ne okazis divido al diversaj grupoj por demandi al unuopaj estraranoj, kio iom bremsis la diskutojn inter estraranoj kaj publiko en pasintjara kongreso.

Mi ekskursis al la urbo Evora en orienta Portugalio, kie eblis vidi, interalie, preĝejon faritan el homaj ostoj. La ideo por la uzo de tiu konstrumaterialo (estis ankaŭ betono aŭ alia materialo por subteni la strukturon) estis franciskana protesto kontraŭ troa uzo de oro en kutimaj preĝejoj kaj memorigo pri la morteco de la homo.

Alia ekskurso portis min al la urbocentro por aŭskulti Koimbran fadon. Apudsidanto ŝokiĝis, kiam evidentiĝis, ke inter la kantistoj estas ankaŭ la prezidanto de LKK (kiu bone kantis) kaj alia LKK-ano (kiu preskaŭ perdis sian voĉon). Nu, por mi la

atmosfera estis hejmeca kaj amikeca, sed samtempe okazis ankaŭ internacia arta vespero (de kie mi ĵus volis per tiu ekskurso eskapi al io loka kaj pli profesia), kaj tiel pensis ankaŭ mia apudulo.

La kultura programo abundis, ankaŭ la kutimaj prelegoj pri la kongresa lando, kvankam unu el tiuj prelegoj ne okazis, ĉar la preleganto simple forgesis pri ĝi aŭ estis okupita aliloke. Vere malmultis portugalaj organizantoj, tamen tio ne aparte rimarkeblis. La scienca programo havis ĉi-foje ankaŭ sciencajn kafejon, kiu enhavis pli mallongajn prelegojn pri sciencaj temoj kaj tiel eblis havi pli da prelegoj en sama tempo.

La kongresa kuriero aperis dum kelkaj tagoj nur en dupaĝa formato anstataŭ la kutima kvar-paĝa, evidente mankis materialo, eĉ se la fotoj estis nekutime grandaj, kaj la redakcio ne sukcesis inventi ion por plenigi la paĝojn. Inter la kurieraj inventitaj aferoj tamen estis la malĝusta dato por la luneklipso en la unua numero (kaj korekto pri tio en dua numero), pro kio tute senkulpe estis persekutita ankaŭ nia astronomo Amri Wandel. Tamen unu novaĵo de la kongresa gazeto estis, ke preskaŭ ĉiunumere aperis rekomendo pri iu inda libro en libroservo. Laŭdire la libroservaj vendoj estis iomete pli bonaj ol en la pasintaj jaroj.

Mi finis la kongreson per Nitobe-simpozio, kiu estis interesa, sed mi perdis la duan tagon pro revenflugo, kiun mi mendis antaŭ ol mi informiĝis pri simpozio.

Tiu ĉi estas la lasta kongresa raporto kiun mi verkas por *La Ondo*. Venontjare mi mem okupiĝos pri kongresaj aranĝoj kaj tiel perdos mian neŭtralecon, kaj krome mi timas ke miaj raportoj komencas tro ripeti sin mem.

Jukka Pietiläinen

104-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO



LAHTI-LAHTIO 2019

Salutmesaĝo de Unesko al la partoprenantoj de la 103a UK

Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio.

Vi havas la ŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruĉiĝo kun diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo.

Mi ne dubas, ke tiu elstara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interŝanĝojn.



Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj.

Estas fakto, ke nia Organizaĵo dividas kun la esperantista Movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikiĝi.

Lingvoj estas la vektoro, kiu ebligas tiun dialogon; ili konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn ni devas konkretigi, kaj same por defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias nuntempe, ke ili malaperas en ritmo de unu malapero dufoje monate. Tio estas giganta perdo por la homa heredaĵo. Ni devas plie defendi plurlingvismon en la instruado per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la Reto, tiel ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco en ĉiuj homgrupoj. Gravus, ke ĉiu sukceso esti en kontakto kun sia historio, sia identeco kaj la simbolaj resursoj de sia origina etno.

Tiu agado de Unesko ankaŭ estas VIA agado. Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de la plimulto. Ĝi ebligas ekziston de homgrupo de parolantoj sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas alten iri kaj atingi kosmopolitikan konscinivelon, esti mondcivitano – sen forlasi siajn apartajn ligojn.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa poskongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Intervjuo



Mark Fettes estas unu el la plej oftaj intervjuatoj en *La Ondo*. Sed la nuna intervjuo estas nekutima, ĉar li konsentis respondi al senprecedence multaj 22 demandoj. La prezidanton de UEA pridemandis nia ĵus ekoficinta vicredaktoro Paweł Fischer-Kotowski, inter kies redakciaj respondecoj estas intervjuado.

Mi restos aktiva en la movado

Mark Fettes respondas

Ĵus komenciĝis la lasta jaro de via prezidanteco en UEA. Laŭ la statuto post la dua oficperiodo vi devos retiriĝi el la posteno. Kion vi planas finfari aŭ ankaŭ iniciati en ĉi tiu periodo? Kio estas via prioritato?

Estas pluraj interligitaj prioritatoj, kiuj celas plifortigi la Asocion kaj lasi al mia posteulo pli bone funkciajn administrajn kaj komunikajn sistemojn. Temas pri membrovarbado kaj membrozorgado, donacvarbado en vasta senco, plibonigo de informfluo inter aktivuloj kaj kun la esperantistaro ĝenerale, kaj la evoluigo de nia nova retejo inkluzive de la membropsaco. La plibonigo de nia financa situacio estas kompreneble ligita al ĉio ĉi. Mi fakte ŝatus dediĉi pli da mia tempo al la agado en la mondo ekster Esperantujo, sed UEA nepre bezonas sekuran organizan bazon por povi tion fari efike kaj longdaŭre.

Sub via prezidanteco en UEA okazis multaj ŝanĝoj, iuj eĉ revoluciaj. Kiel vi koncize resumas tiun periodon, se vi devus rakonti pri la evoluoj al esperantisto ĵus vekiĝinta post kvinjara komato?

Mi plejparte akuŝis ŝanĝojn kiuj estis delonge “en la aero”, unuavice pro la influo de interreto, ne nur al la Esperanto-komunumo sed al la monda socio. La ŝanĝoj en nia Statuto, aprobitaj en 2016, grandparte rilatis al tio; la enkonduko de reta voĉdonado por la Komitato kaj nun, plej laste, de reta membreco estis ideoj plurfoje proponitaj antaŭ mia tempo kiel Prezidanto. Verdire mi volis ŝanĝi multe pli, sed ne estas facile konvinki homojn pri la bezono de ŝanĝo, precipe en movado lingva kaj kultura, kiu estas konservativa preskaŭ laŭdifine.

En 2013, kiam la Komitato de UEA unuanime elektis vin kiel prezidanton, ĝi akceptis la ampleksan Strategian Laborplanon por la sekvaj kvar jaroj. Ĉi tiu dokumento, pretigita laŭ via iniciato kaj sub via gvido, estis kvazaŭ via balotprogramo kaj ĝi donis esperon pri nova direktigo de la asocio. Se oni hodiaŭ foliumas ĝin, oni konstatas ke ĝi grandparte restis nur surpapere. Pri la plejparto de la gvidlinioj ne plu memoras ne nur simplaj membroj, sed ŝajne ankaŭ la estraranoj. Kio okazis, ke viaj du estraroj praktike rezignis pri la planoj?



En 2013 Mark Fettes estis proklamita la Esperantisto de la Jaro, interalie, "... pro la kreado kaj diskonigado de la nova Strategia Laborplano de UEA; kaj pro alporto de nova etoso kaj energio al la gvidado de UEA". (Foto: Francisco L. Veuthey)

La Strategia Laborplano el 2013 estas tiel ampleksa, ĉar ĝi provas difini agad-direktojn ne nur por la Estraro sed por ĉiuj aktivuloj de la Asocio. Ekzemple, unu el la ideoj en ĝi konsistas en la starigo de landaj laborgrupoj el aktivuloj por TEJO, UEA kaj ILEI. La Estraro povas instigi homojn al tia kunlaboro, sed evidente ne povas reĝisori la agadon en dekoj kaj dekoj da landoj. Eblus fari pli, se oni disponus pri pagataj laborfortoj por tia kunordiga laboro, sed fakte la Centra Oficejo povas disponigi tre malmulte da rimedoj por helpi la Estraron, ĉar la rutinaj administraj taskoj pri membroj, mono, libroj kaj kongresoj jam pli ol plentempe okupas la oficistojn. Tio estas aspekto de UEA, kiun mi esperis ŝanĝi, sed pro diversaj evoluoj – interalie la malboniĝanta financa situacio – la laborfortoj de la Oficejo fakte ŝrumpis en la lastaj jaroj.

Ne imagu, tamen, ke la Strategia Laborplano ne donis utilan direkton al la Estraro. Kelkaj el ĝiaj emfazoj, ekzemple pri kapabligo (kiel ĉe la AMO-seminarioj) aŭ pri adaptado de UEA al la reta epoko, efektive estis konstantaj gvidlinioj por ni.

Malgraŭ la skrupula planado viaj estraroj ekde la komenco laboris ĉefe pri aferoj, pri kiuj la Strategia Laborplano silentis. La ŝanĝo de la statuto kaj la sendependigo de TEJO estis grandaj paŝoj, pri kiuj vi ne parolis pli frue. Kial?

Nu, mi malkonsentas, ke ni laboris “ĉefe” pri aferoj ekster la Strategia Laborplano. Mi dirus, ke 90% de la laboro de la Estraro rilatas al la 12 strategiaj prioritatoj listigitaj tie. Evidente oni tamen devas respondi al evoluoj, kiujn la planoj ne antaŭvidis. Fakte jam en Rejkjaviko mi havis la unuajn konversaciojn kun TEJO-gvidantoj pri la bezono de jura memstareco, kaj tio estis plurfoje preparolita en la Komitato antaŭ ol ni portis la aferon al la Ĝenerala Voĉdono.

Mi cetere kredas ke tio, kune kun la ceteraj ŝanĝoj en la Statuto, estis plene konformaj al la emfazo en la Laborplano pri organiza renovigo. Statutŝanĝoj estas rimedo, ne celo en si mem.

Inter la gvidlinioj de la Strategia Laborplano estis, ekzemple, ĉiujara altigo de la membronombro je 10%. Sur tiu kampo ni notas fiaskon, kiu kaŭzas malbonajn sekvojn ankaŭ en aliaj branĉoj. Kio okazis? Kial UEA ne sukcesas almenaŭ teni la membronombro ekvilibra, sed eĉ perdas siajn membrojn?

Analizo de nia membraro dum la lastaj dudek jaroj montras ke tiu ŝrumpado estas longperspektiva tendenco, do ne fenomeno nur de la lastaj jaroj. La kialoj sendube estas kaj sociaj kaj organizaj. Socie, homoj klare tendencas membriĝi malpli nuntempe en asocioj de nia speco. Organize, la membrovarbado de UEA neniam estis tre profesia, ĉar ĝi tro pasive dependas de la realiĝado de jamaj membroj kaj la malkovrado de UEA flanke de novaj esperantistoj. Ni nun komencas iom plibonigi tiun situacion kunlabore kun la nuna Ĝenerala Direktoro, sed se mi rigardas al la nuntempaj strategioj de asocioj kun amasa subteno, mi pensas ke UEA devas ankoraŭ multe evolui tiurilate.

Ĉu la estraro faris analizon pri la (mal)sukcesoj de la Strategia Laborplano? Ĉu vi proponos al la Komitato novan Planon por la venontaj jaroj, aŭ almenaŭ iniciatos laboron pri tia dokumento?

Ni ne faris analizon, precize, sed jes okazis pluraj diskutoj pri nia strategio kaj pri tio, kiel devus aspekti nova strategia plano. Mi fakte esperis diskutigi la Komitaton pri tio en Lisbono, sed la decidoj pri la nova kotizsistemo okupis la disponeblan tempon. Ni faros proponon al la Komitato, laŭ kiu la Strategia Plano estos tre simpla, dupaĝa dokumento, kiu servu kiel bazo de laborplanoj por diversaj branĉoj de UEA (kiel la Estraro) kaj diversaj agadkampoj (kiel eksteraj rilatoj, aŭ financa evoluigo). Ŝajnas al mi ke la longeco kaj detaleco de la plano el 2013, kvankam iusence utilaj, limigis ĝian influon, ĉar malmultaj homoj pretas legi kaj digesti tiel ampleksan analizon, aŭ uzi ĝin por gvidi la propran agadon.

Kio estis bazo por la decidoj rilate la enhavon de la Laborplano? Ĉu vi diskutas en la estrara aŭ pli granda rondo, ĉu vi kontaktas eksterajn spertulojn aŭ enketas inter la membroj pri iliaj ideoj kaj bezonoj?

Kiel dirite, pri la malgranda strategia kerno okupiĝas la Estraro. Mi partoprenis en diversaj tiaj strategiaj konsultoj por aliaj organizoj, kaj ĉiam la fina decido restas ĉe la gvidanta kerno, pro la bezono de kohereco. Sed la vere decida fazo estas la sekva: uzi la strategian kernon por enplekti laŭeble multajn homojn en la planado de la agado sur plej diversaj kampoj. Ni ne disponis pri la rimedoj por efike fari tion en 2013, sed la nunaj evoluigaj paŝoj pri nia retejo kaj membrospaco espereble malfermos novajn eblojn por la venonta Estraro.

La plej granda projekto de via sesjara prezidado, almenaŭ laŭ la financa vidpunkto, estas la renovigo de la retejo, por kiu en Rejkjaviko la Komitato rezervis 100 mil eŭrojn el la kapitalo. Antaŭ nelonge ni aŭdis, ke la nova retejo estas preskaŭ preta. Kiam ĝi anstataŭos la ĝisnunan? Kiujn novaĵojn portos la nova sistemo?

Ni enkondukos la novigojn paŝon post paŝo. Ili parte estos nevideblaj por la ordinara membroj, ĉar temas interalie pri la modernigo de la datumbazoj kaj administraj sistemoj kiuj kuŝas malantaŭ la reteja surfaco. La nova membrospaco, ellaborita por funkcii optimume per poŝtelefonoj, funkcios kunlige kun nova membrodatumbazo kiu estos multe pli sekura kaj moderne programita ol la malnova. Iom post iom ni aldonos novajn funkciojn al la membrospaco, ekzemple pri aliro al sia UEA-konto, reta voĉdonado pri Komitatanoj B, aĉetado de libroj kaj aliaj varoj el la Libroservo, ktp. Ni tamen paŝas singarde por certigi ke ĉio funkcias sekure kaj konforme al la novaj eŭropaj reguloj pri datumprotektado.

Pri iuj punktoj la estraroj sub via prezido alprenis decidojn kaj poste tute ŝanĝis ilin. Tio donas impreson pri senpripensaj elpaŝoj sub momenta impulso, aŭ eble en la estraro tiom bolas, ke la decidoj estas farataj per malgranda plimulto kaj post kelkaj monatoj pli fortan subtenon gajnas alia ideo. Tiel estis, ekzemple, pri la Afrika Oficejo kiun oni ŝanĝis en du apartajn oficejojn, sed unu jaron poste malfondis ilin ambaŭ. Simile pri la propono enkonduki senpagan membrokategorion Amikoj de Esperanto, kaj la posta propono modifi la membrisistemon tiel ke ĉiuj membroj estos kvazaŭ Amikoj (sen la revuo, sen la Jarlibro) kaj tamen ili pagos baze 44 eŭrojn jare. Por daŭrigi, tio validas ankaŭ pri la personaro: sub via prezidanteco estis jam tri ĝeneralaj direktoroj kaj kvin-ses redaktoroj de la revuo *Esperanto*. Malkaŝu iom, kio okazas malantaŭ la kulisoj?

Via aserto pri la Amikoj de Esperanto estas funde erariga, same kiel la aludo al kotizo de 44 eŭroj por ĉiuj membroj. Mi estas surprizita ke inteligenta kaj bone informita homo povas tiel torde misprezenti facile kontroleblajn faktojn. Efektive la

tuta demando komenciĝas per stranga interpreto de la historio, kvazaŭ la Estraro agus aŭtonome, sen rigardo al la rezultoj de la laboro aŭ la opinioj de la Komitato aŭ aliaj kunlaborantoj. Ni ĉiam faris decidojn surbaze de la plej bonaj disponeblaj informoj en la koncerna momento, ekzemple pri dungoj, kaj ni ofte faris proponojn, ekzemple pri la Amikoj de Esperanto, por povi ricevi reagojn kaj alternativajn ideojn. Neniu decido estas farita sen konsultado kaj diskutado pri la plej bona elekto. Jes, ni plurfoje devis konkludi, ke la vojo kiu unue ŝajnis plej promesplena tamen ne kondukis al la celo, do necesas provi ion alian. Tio estas tamen pli bona konduto, ol resti obstine ĉe jam farita decido.

Via unua estraro kun granda entuziasmo dungis novan Ĝeneralan Direktoron, kaj vi mem esprimis vin ĉiam kun granda kontento pri ŝi, sed en la dua oficperiodo la Estraro subite maldungis ŝin kaj anstataŭigis per la ĝistiama Ĝenerala Sekretario. Kio kaŭzis tiun subitan turniĝon? La posteulo estis rapide enpostenigita, sen konkurso, kaj li ne ekloĝis en Roterdamo. Ĉu tiu solvo estas provizora aŭ vi ŝatus ke la oficejo laboru ĝuste laŭ tiu sistemo?



Veronika Poór

Veronika Poór restis du jarojn en sia posteno. Dum tiuj du jaroj mi intense kunlaboris kun ŝi por provi solvi la diversajn problemojn, kiujn ŝi devis alfronti. Estis vere tre malfacila periodo interalie pro la malsaniĝo de la eliranta Ĝenerala Direktoro, kio malhelpis la transdonon de spertoj kaj konoj, kaj la postan malsaniĝon de alia kerna oficisto; krome neatendite akriĝis la rilatoj kun TEJO, kio postulis amason da tempo kaj energio por solvi. La decido serĉi alian postenulon ne estis facila, sed ŝi kaj mi venis pli-mapli samtempe al la sama konkludo. Tiam ni devis trovi rapidan solvon, kaj estis nur unu homo kiu posedis la detalan konon de la Asocio kaj la administrajn kapablojn kiujn ni bezonis, kaj kiu estis preta pli-malpli tuj enlaboriĝi. Mi daŭre kredas ke tio estis la plej bona decido por la Asocio. Ke Martin plejparte laboras ekster Roterdamo, tio estas eble neideala situacio, sed tamen malpli grava en la praktiko ol oni ofte imagas; jam signifa parto de la laboro de la Asocio okazas en aliaj mondopartoj, kaj nia financa evoluo pli-malpli devigos nin sekvi tiun vojon ankaŭ estonte, ĉar ni simple ne povas pagi tiom da nederlandaj salajroj, kiel ni povis permesi al ni antaŭ dudek jaroj.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa poskongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Inter la multaj esperantistaj eventoj de ĉi-jara Kongresa Sezono estis grandaj kongresoj kaj etaj renkontiĝoj, kiel RET en Ŝuja (vd. p. 36), kiuj ebligas bone pasigi la tempon en agrabla Esperanta etoso. (Foto: Aleksandr Osokin)

Hispana Kongreso, la unua el la kvar sinsekvaj

Sub varmega suno, sed en alloga kongresejo, kie regis vere Esperanta etoso, homoj el diversaj regionoj de Hispanio kaj el eksterlando la 20-22an de julio partoprenis la 77an Hispanan Kongreson de Esperanto. Oni povas diri, ke ĉi-jare la kongreso estis la komenco de kvar sinsekvaj internaciaj eventoj, t. e. Hispana kaj ILEI (Madrido), UK (Lisbono) kaj IJK (Badajoz). Mi raportos nur pri la unua, ĉar mi certas ke aliaj kongresanoj okupiĝos pri la ceteraj kaj mi kiel hispano devas informi pri mia sperto en la ĉefurbo Madrido, kie mi loĝis dum miaj junaj jaroj.


La universitata rezidejo (studenthejmo) Colegio Mayor Teresa de Jesús estis nia restadejo dum kelkaj tagoj kun komfortaj ĉambroj, bongusta manĝo kaj diversaj salonoj dediĉitaj ĉi foje al hispanaj Esperanto-pioniroj kaj kompreneble, la ĉefa salono estis dediĉita al Zamenhof, kie oni celebris la oficialan malfermon.

Krom la kutimaj prelegoj, ok gvidantoj kaj helpantoj montris al la scivoluloj la belecon de la urbo per piedaj ekskursoj tra la historia kaj moderna Madrido. Mi, kiel gvidanto, havis la okazon montri la beletran kvartalon, kiun iamaniere mi ankaŭ malkovris, sed ĉi foje pli profunde, ĉar stari antaŭ la pordo, kie naskiĝis Miguel de Cervantes, la aŭtoro de Don Kiĥoto, ne estas kutima afero. Ni trairis kelkajn stratojn, kie staras la plej gravaj teatroj kaj teatrejoj de la urbo, kaj iamaniere mi tra-

vivis kulturen sperton rememorante tiun tempon. La ceteraj ekskursoj tra Madrido estis vere interesaj, mi nur mencias ilin, ĉar mi ne havis tempon partopreni. Temas pri Moderna, Klerisma, Esenca Madrido... gviditaj de volontuloj, kiuj vere konas kaj amas la historion.

Kompreneble ne mankis distro, kleriga programo, kursoj de Esperanto, junulara programo, gufujo / amikujo, ktp.

Estas menciindaj la inaŭgura prelego de Dennis Keefe "Madrido kaj Movado dum la Movido: Observoj de naiva novbakita Esperantisto en la Madrida Esperanto-Liceo (MEL) de 1980 ĝis 1988", la prelego de Riccardo Lamperti "Unamuno estis volapukisto", la projekciado de



Ili rajtas esti kontentaj. Ángel Arquillos, José Antonio del Barrio kaj Águeda Biurrun: vicprezidanto, prezidanto kaj sekretario de la landa asocio HEF. (Foto: Mariló Dolores)

la filmo *Stranga nupto* kun kolokvo de la filma ĉefrolulo Ángel Arquillos, t. e. mi mem.

La andaluza esperantisto profesoro Vicente Manzano Arredondo prelegis pri “Senpaga utila esplorado aŭ kiel oni gajnu ŝancojn en la Universitato de Sevilo”. Ĉi tiu programo tre sukcesas en Sevilo. Ana Manero prelegis pri “Maruja Mallo multe pli ol avangarda artistino”.

Miguel Gutiérrez Adúriz prezentis la kvaran eldonon de la Hispana-Esperanto vortaro, Miguel Fernández prezentis la verkojn: *Ha, Karmela kaj Revene*, kaj ne devas forgesi la interesajn poemverkojn far Jorge Camacho *Palestino strangolata kaj Brulvunde*.

La muzika grupo *Kaj Tiel Plu* dum la interkona frandvespero vigligis la etoson, invitante al dancado, dum multaj partoprenantoj el diversaj landoj ofertis tipajn manĝojn por gustumado en la granda korto de la restadejo. La dueto *Kajto*, kiel ili longe kutimas, okazigis kant-atelieron kaj instruis nin ĝui en Esperanto per facilaj vortoj kaj amuzaj kantoj.

Laŭ mi, la plej grava momento estis *Vivu la Teatro* kun partopreno de multaj homoj, dancistoj, kantistoj, poetoj el Sudkoreio, Japanio, Nepalo, Meksiko, Usono, Kubo, Hispanio... La organizanto de ĉi evento Miguel Fernández bele deklamis kaj kantis.

La aŭkcio preskaŭ donacis valorajn librojn kaj objektojn kontraŭ malalta prezo al la plej kuraĝaj, kiuj volis partopreni.

Por fini mian raporton, mi vigligas vin partopreni la sekvajaran Hispanan Kongreson de Esperanto kaj la kongreson de IFEF, kiuj okazos la unuan semajnon de majo en la t. n. Urbo de la Paradizo (Malago), kie la vetero estas ĉiam agrabla kaj la suno brilas pli ol 350 tagojn de la jaro, tie finiĝas Eŭropo kaj komenciĝas Afriko, kiun ni vizitos dum la postkongreso.

Ángel Arquillos

Lviv, mirinda kaj vizitinda

Ĉi-jare la tradicia Esperanto-renkontiĝo en la ukrainia urbo Lviv logis 32 esperantistojn el sep landoj. La plej granda grupo venis el Pollando.

Okazis trinivelaj kursoj de Esperanto, ekskursoj kaj piedmarŝoj, vespere – distraj aranĝoj kaj koncertoj. La mirinda urbo Lviv kune kun la familia Esperanto-etoso, enigmaj malnovaj stratetoj, fajna kafo, ukraina vino estas neforgesebla evento de la kuranta jaro. Estu ĝi venontjare pli ĉarma kaj plezura!

Volodimir Hordijenko

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa poskongresa Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Giorgio Silfer en sia komentario (vd. p. 51) prezentas la lastatempajn ŝanĝojn de la oficiala statuso de lingvoj, uzataj en Israelo.

50 jaroj da elstara agado: honorigo de ESF



Ĉeestantajn estraranojn kaj kunlaborantojn de ESF veni sur la podion por ricevi la aplaŭdojn de la publiko.

Dum tridek jaroj post ĝia fondo, la rimedoj kaj agado de ESF iom post iom kreskis, danke al donacoj kaj heredaĵoj de diversaj esperantistoj. Ekde la jaro 2000, pro heredaĵo de esperantista paro Bill kaj Cathy Schulze, ĝi komencis pli grand-skalan aktivecon ankaŭ sur la tereno de lernado kaj instruado de Esperanto. Ĝi financis centojn da diversaj projektoj, interalie:

- ellaboron de la edukaj retejoj lernu.net kaj edukado.net
- kreon de skriba korpuso de Esperanto: tekstaro.com
- plurajn Nitobe-simpoziojn (plej lasta el kiuj okazis ĉi-jare en Lisbono),
- kreon de la dokumentfilmo *The Universal Language* kaj la videokurso *Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo* (havebla plene ĉe YouTube),
- starigon de Esperanto-ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj,
- kaj de CED-fonduso por subteni studojn pri Esperanto kaj interlingvistiko.

ESF daŭre subtenas la postdiplomajn studojn pri interlingvistiko kaj esperantologio en Poznano, NASK – Nord-Amerikan Someran Kursaron – altnivelajn studojn de Esperanto en Usono, donas plurajn stipendojn al esploristoj por esploroj kaj publikigo, kaj subtenas la laboron de la redaktoro de Edukado.net per ĉiumonata honorario.

Trezoro Huang Yinbao, UEA-estrarano kaj la redaktoro de la Esperanta eldono de *Unesko-Kuriero*, speciale dankis al ESF pro la subteno de kernaj agadoj kaj servoj de UEA, kiel la Biblioteko Hodler, la Katedro pri Esperanto kaj Interlingvistiko ĉe la Universitato de Amsterdamo, kaj *Unesko-Kuriero* mem. Trezoro menciis, ke UEA plurfoje donis Diplomojn pro Elstara Agado al projektoj kaj homoj, kiujn ESF finance subtenis. “Hodiaŭ ni volas honori la fondaĵon mem, kiu donis la bazon por tiom da valoraj projektoj. La literoj ESF povas havi multajn signifojn. Mi proponas, ke plej trafe, ESF devas signifi ‘Elstare Sukcesa Financado’.”

Humphrey Tonkin, kunfondinto kaj la nuna prezidanto de ESF, rimarkis, ke zorge kaj konservema traktado de la financaj rimedoj ebligis, ke hodiaŭ per la fruktoj de tiu kapitalo, ESF povas disdoni preskaŭ kvaronmilionon da dolaroj en diversspecaj

subvencioj ĉiujare. Li ankaŭ rimarkis ke ĝuste nun, sojle al la 75-jara datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj, la demando pri lingva justeco fariĝas pli kaj pli brula. D-ro Tonkin substrekis, ke la sukceso de ESF ne estus ebla sen la kapitalo malantaŭ ĝi, kaj invitis la ĉeestantojn subteni per donacoj kaj UEA-n, kaj ESF-on, kaj ideale ambaŭ, “ĉar mono ebligas sukceson. Do, al la venontaj 150 jaroj da sukceso!”

Por trovi pliajn informojn, ekscii pri la eventualaj subvencioj por via projekto, fari donacojn ktp., bv. viziti la retejon de ESF: www.esperantic.org.

GK UEA

Premio Pirlot denove

Ekde 2016, post interrompo de 15 jaroj, AIS denove okazigas la konkurson Premio Pirlot, por la plej bonaj sciencaj verkoj. Fine de la 103a UK en Lisbono dum la Scienca Forumo estis anoncitaj la gajnintoj por 2018. Temas efektive ne nur pri la jaro 2018, sed pri la lastaj kvin jaroj. La juĝkomisiono (profesoroj Fössmeier, Maitzen kaj Minnaja) ricevis 38 proponojn de 19 aŭtoroj. Jen la rezultoj:



Libroj

1. Amri Wandel: *La kosmo kaj ni*, 3a eldono (FEL 2017)
2. Amri Wandel (red.): *Internacia Kongresa Universitato, 70a sesio* (UEA 2017)
3. Lode van de Velde: *Manĝeblaj sovaĝaj plantoj*

Artikoloj

1. Disheng Wang: *Simpla Eksplikado pri la kuracado de Multobla Sklerozo el la vidpunkto de Tradicia Ĉina Medicino* (2014) kaj Javier Alcalde: *La pacisma aliro* (2018)

3. Amri Wandel: *Nova horizonto trans Plutono* (*La Ondo de Esperanto*, 2018) kaj Christoph Klawe: *Pri medicina terminologio en Esperantujo* (Recenzo de *Ok-lingva Medicina Enciklopedia Vortaro* de Jozo Marević, 2016)

Kursoj

1. Amri Wandel: *Enkonduko al astronomio* (Reta Universitato de Esperanto) kaj Christer Kiselman: *Digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado* (SUS34, Varsovio 2017)

Prelegoj

1. Amri Wandel: *Nigraj Truoj* (Kataluna Kongreso 2017)
2. François Lo Jacomo: *Primnombroj* (IKU 2017)
3. Xavier Alcalde: *Solidareca agado pri migrantoj kaj rifuĝantoj en Eŭropa Unio* (IKU-AIS 2017)

Amri Wandel

La israela kazo kaj “lingva demokratio”

(HeKo) La Parlamento de Israelo ĵus aprobis leĝon, kiu ŝajnas taŭga por konduki al skizofrenio certajn esperantistojn. Temas pri ambigue interpretebla ŝanĝo de la lingva reĝimo en la lando.

Unuflanke, la ĝisostaj finvenkistoj, malamikoj de la angla lingvo, devus ĝoji, ĉar la angla ne estas plu oficiala en la ŝtato. Kompreneble ĝi ne estas malpermesata, kaj ĝi restas unu el la plej komprenataj en la lando (kvankam malpli ol la rusa, pro la olimoj). Tamen ĝi malaperos el la oficialaj dokumentoj, unuavice el la bankbiletoj kaj el la voĝsildoj. Per tiu parlamenta decido, forte dezirata de la nuna registaro, fermiĝas preskaŭ jarcenta epoko: ja la angla envenis Palestinon pro la atribuo al la Brita Imperio (tiam ankoraŭ vere imperia) de teritorio sub mandato de Ligo de Nacioj. Do unu landon malpli en la angla ekumeno.

Sed kun la angla, ekde la 1920aj, apudvivis du aliaj lingvoj: la (nov)hebrea kaj la araba. La fino de tiu epoko signifas ankaŭ la maloficialigon de la araba. Kaj dum la anglalingvanoj (kontraŭ kiuj la cionistoj relative ofte pafis) foriris de longe, arablingvanoj daŭre vivas en Israelo, eĉ konsistigas fortan minoritaton. Tiom ke, se hodiaŭ ekestus du ŝtatoj en Palestino, certe unu estus plene araba, dum la alia ne povus esti plene hebrea.

La decido de la israela parlamento devus embarasi tiujn kiuj pledas por “lingva demokratio”, se tiu esprimo indikas respekton por la minoritatoj, kaj ne estas nur vaka formulo por ial pravigi la ekziston de neregistara internacia organizo nomata UEA, kun individuaj membroj kulturpolitike motivitaj, ne plu per la pacifismo de Hodler kaj Privat, sed per la pragismo de Fettes.

Lingvopolitiko restas ankoraŭ tiel akcesora fako, ke certe prezidento Trump ne zorgos pri la senrangigo de la angla, ĝuste kelkajn semajnojn post la agnosko de li donita al Israelo, per la inaŭguro de la usona ambasado en Jerusalemo. Kvankam ĝuste la usona delegacio protestis pro la Unesko-rezolucio kiu arabigas ĉiujn toponimojn en Jerusalemo: do ia konscio pri la problemaro tamen ekzistas.


Efektive estas malagrabla, kiam lingvoj ne gajnas sian rangon per muziko, kulturo aŭ eĉ sporto kaj gastronomio (kiel okazis kaj plu okazas por la itala, sen bezono de parlamenta normigo), sed ili fariĝas parto kaj rimedo por naciisma taktiko. Des pli ke tiam la kontraŭa movo plu rilatas al alia ŝovinismo.

Se mi havus la (mis)ŝancon esti ŝemido en Israelo, mi elektus alian strategion. Mi batalus por ke la tuta socio konsistu el dulingvuloj, arabe kaj hebree. Certe gramatike kaj leksike ne perfektaj (ĉu la olimoj mem plene posedas la hebrean?), sed homoj avangardaj. Kaj tio estus mia maniero esprimi malkonsenton; eĉ sen bezono de “lingva demokratio”.



Giorgio Silfer

Arkivo



Antaŭ 30 jaroj forpasis Tibor Sekelj. Vojaĝanto, esploristo, ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto; kunfondinto kaj gvidanto de la legenda IOE, iniciatinto de la rezolucio de Unesko pri Esperanto en Sofio (1985), kunfondinto kaj la unua prezidanto de nia verkista asocio EVA, aŭtoro de pluraj libroj, interalie, de *Kumeŭaŭa* kiu aperis jam en 24 nacilingvaj versioj.

Jubileoj kaj memordatoj en septembro 2018

3. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Josip Pleadin** (1958-1977-), jugoslavia kaj kroata eldonisto, presisto kaj esperantisto; redaktoro kaj eldoninto de pluraj verkoj en/pri Eo, aŭtoro de *Biografia leksikono de kroataj esperantistoj* (2002), *Ordeno de Verda Plumo* (2006) kaj *Cigna kanto* (2013).

5. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Magomet Izmajloviĉ Isajev** (1928-1956-2011), sovetunia kaj ruslanda lingvisto kaj esperantisto; prezidanto de E-Komisiono ĉe Unio de Societoj de Amikeco kun Eksterlando (1971-79), la unua kaj sola prezidanto de Asocio de Sovetiaj E-istoj (1979-89), vicprezidanto de MEM (1976-88), aŭtoro de pluraj verkoj pri Eo kaj interlingvistiko, interalie, de la monografio *Jazyk Esperanto* (1981) kaj de la lernolibro *Uĉebnik jazyka Esperanto* (Kun Z. Semjonova, 1984).

6. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Michel Duc Goninaz** (1933-1946-2016), franca lingvisto kaj esperantisto; gvidanto de la reviziado de la novaj eldonoj de PIV (2002, 2005), membro de la Akademio de Eo (1976-2016) kaj direktoro de la Akademia sekcio Gramatiko (1983-92), aŭtoro de *Vocabulaire Espéranto* (1971) kaj *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko* (1974), tradukinto de *La fremdulo* (A. Camus, 1993), *Sonĝonovelo* (A. Schnitzler, 1997), *Kun diablo en la korpo* (R. Radiguet, 2006) k. a.; la Esperantisto de la Jaro 2002.

11. Antaŭ 90 jaroj naskiĝis **Ottó Haszpra** (1928-1958-2012), hungara hidrologo kaj esperantisto; vicprezidanto de HEA (1981-90), komitatano (1980-90) kaj estrarano (1986-90) de UEA, gvidanto de Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto (1981-85), rektoro de IKU en la 68a UK (Budapeŝto, 1983), membro de la Akademio de Eo (2004-12), redaktoro de *Sciencaj komunikajoj* (1974-79), aŭtoro de pluraj fakaj E-verkoj kaj de ampleksa lernolibro *Eszperantó kezdőknek és haladóknak* (2000); honora membro de UEA (2006).

19. Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Probal Dasgupta** (1953-1967-), bengala lingvisto kaj esperantisto; reprezentanto de UEA ĉe UN en Novjorko (1977-79), reĝisoro de la kongresa temo en tri UKoj (1988, 1994, 2003), prezidanto de UEA (2007-13), membro (1983-), vicprezidanto (2001-16) kaj prezidanto (2016-) de la Akademio de Eo, kunredaktoro de *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado* (1989-) kaj *Beletra Almanako* (2007-); aŭtoro de *Loĝi en homaj lingvoj* (2011), tradukinto de *Primico* (R. Tagore, 1977), *Mi juna* (M. Dasgupta, 1989), *Klera edzino* (U. Gangopaddhae, 1994), *Dormanta hejmaro* (M. Dasgupta, 2006), *La vivo de Damoru* (T. Mukhopadhyay, 2011) k. a.

23. Antaŭ 30 jaroj mortis **Tibor Sekelj** (1912-1929-1988), jugoslavia vojaĝanto, esploristo, ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto; kunfondinto kaj gvidanto de Internacia Instituto por Oficialigo de Eo (1966-72), iniciatinto de la rezolucio de Unesko pri Eo en Sofio (1985), kunfondinto kaj la unua prezidanto de EVA (1983-88), aŭtoro de *Nepalo malfermas la pordon* (1959), *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* (1979, jam 24 nacilingvaj tradukoj), *Mondo de travivaĵoj* (1981), *Elpafu la sagon* (Trad., 1983), *Ĝambo Rafiki* (1991) k. a.; honora membro de UEA (1986).

Aleksander Korĵenkov

Francisko Valdomiro Lorenz omaĝita en sia patrujo

La nomon F. V. Lorenz (1872-1957) esperantistoj kutime ligas kun fondo de la brazila Esperanto-movado kaj kun spiritismo. En Brazilo portas lian nomon eldonejo, esplorinstituto en Porte Allegre kaj kulturdomo kaj biblioteko en Dom Feliciano, kie li loĝis. Malpli konate estas, ke li estis ĉeĥo, kiu al Brazilo kaŝe elmigris kiel 21-jarulo kaj vivis tie ĝismorte. Sed antaŭ tio, kiel nur 18-jara malriĉa studento, li sukcesis en 1890 eldoni proprakoste la unuan Esperanto-lernolibron por ĉeĥoj. Tiel ĉeĥaj kaj brazilaj esperantistoj fakte havas la komunan prapatron.

Sed eĉ multe pli interese estas priksideri liajn geniajn kapablojn koncerne lingvojn. Laŭ atestantoj li scipovis aktive de 80 ĝis 104 lingvojn kaj neniuj ĝis nun sukcesis klarigi kiel, se li vivis la tutan vivon en malgranda urbeto for de civilizo kun bibliotekoj. Li, ekzemple, savis 24 malaperantajn indiĝenajn lingvojn, priskribinte ilian gramatikon (en 2015 estis i.a. reeldonita lia *Kompleta gramatiko de la tupia lingvo*). Multajn el la lingvoj li regis majstre kiel brila tradukisto. Krom sia instruista laboro kaj vivtenado kaj edukado de 13 gefiloj, krom kiuj li plurajn adoptis, li estis ankaŭ sukcesa naturkuracisto kaj aŭtoro de diverstema spirita literaturo. Nombro de liaj verkoj estas ĉ. 80. Li do meritas esti aprezata ne nur kiel pionira esperantisto, sed ankaŭ kiel poligloto, literaturisto kaj bonfaranto.

Malgraŭ sia eksterordinareco li estas malmulte konata en sia patrolando Ĉeĥio, eĉ en la vilaĝo Zbyslav en centra Bohemio, kie li dum Kristnasko 1872 naskiĝis. Tio parte ŝanĝiĝis la 8an de julio 2018, kiam en la komunumo Vrďy, al kiu nun administre Zbyslav apartenas, okazis solena ceremonio omaĝe al Lorenz (ĉeĥe: Lorenc), kadre de kiu la loka biblioteko alprenis lian nomon, kaj sur ĝia konstruaĵo estis senvualigita memortabulo, skulptita de la esperantisto Zdeněk Myslivec.

La solenaĵo okazis en kunlaboro inter la komunumo Vrďy kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio; tial ĉ. duono de la partoprenantoj estis esperantistoj. La renkontiĝo komenciĝis en la proksima urbeto Čáslav, kie oni konatiĝis ne nur kun la historiaj memoraĵoj, sed ankaŭ promenis laŭspure de la juna Lorenz, kiu tie dum ses jaroj frekventis lernejon (kiun oni povis vidi). Marŝante ĉiutage 6 km tien kaj 6 km reen, li, por ne enui, lernis dumvoje fremdajn lingvojn. Interese estas, ke en la urbo naskiĝis ankaŭ la fama filmreĝisoro Miloš Forman kaj la konata Esperanto-poetino Eli Urbanová, kiu priskribas siajn rememorojn pri la loko en sia tikla aŭtobiografia romano *Hetajro dancas*.


Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa poskongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Larĝangulo


Mortigaj robotoj: Ĉu neevitebla minaco?



Vasilij Syčëv (Василий Сычев)

Artefarta intelekto estas vaste uzata en la militaj kaj sekurecaj kampoj. Ĝi faciligas la plenumon de multaj praktikaj taskoj, permesas ŝpari homajn vivojn en la evento de damaĝo al milita teamo, helpas soldatojn en la batalkampo kaj pligas la batalkapablon de armitaj fortoj. Laŭ iuj fakuloj, mortigaj aŭtonomaj batalistoj (Lethal Autonomous Weapon Systems, LAWS) markas la trian revolucion en milita afero post la invento de pulvopafiloj kaj nukleaj armiloj. *Jam temp' estu* ekmaltrankviliĝi pri tio, al kio povas konduki la kreo de robotoj armeoj kapablaj memstare konduki militajn operacojn.

Multaj kompanioj tra la mondo aktive efektivigas sciencajn esplorojn en la kampo de artefarta intelekto (AI). La ĝis nun farita laboro atingis bonegajn rezultojn: artefarta intelekto jam lernas antaŭdiri la riskon, ke povas aperi diablo, aŭ la "inteligenta" breŝverŝo, aŭ distingi nevojajn kancerajn certajn kanceroperojn, aŭ ties aspekto. Tia potenco ĉi superanta la homan intelekton laŭ unu el la plej gravaj parametroj - rapideco, ekintereso ankaŭ militojn.

Danke al la evoluo de komputilaj teknologioj, la batalistoj de estonteco fariĝos pli aŭtonomaj ol la modernaj. Partia aŭtonomeco havas nediskuteblajn avantaĝojn, ja la soldatoj ekhavas rapidajn helpantojn. Sed ĉi tiu procezo havas ankaŭ negativan flankon - temas pri veturado inter landoj, milita senpenco en militaj zonoj kaj malrespondeco pri decidoj. Hodiaŭ, multaj entreprenistoj, politikistoj kaj sciencistoj klopodas, ke la uzo de aŭtonomaj batalistoj estu malpermesita, dum militistoj certigas, ke la

Publika opinio pligras mobilizante kontraŭ la disvolvigo de mortigaj aŭtonomaj armiloj.

fina decido - ĉu mortigi aŭ ne - dumtute tamen prenos homo.

Oni ŝatus tion kovi, certe, sed oni devas ankaŭ memori, ke nulojn armilojn, kiuj preferu tuze ne ekzistintu, kaj kiuj havis multajn kontrolojn ankoraŭ je la elborento, oni tamen jam uzis dum milito.

Virtuala helpanto

Artefarta intelekto povas konsiderinde faciligi kaj akceli la laboron de homoj en ĉiuj kampoj de aktiveco, ankaŭ pri sekureco. Tiel, sciencistoj de la Universitato de Granada en Hispanio okupiĝas pri la elboreco de programaro per netaŭg retoj, kiuj kapablas praktike tuze kaj kun tie alta precizeco identigi endokso-paŝojn - patolojn, malsanojn, sturmasojn. Modernaj sekurecaj sistemoj, kiuj certas aferoj, inkluzivas grandan kvanton da video-registaroj, la "okuloj" de ĉi tiu tiu homoj operatoroj transgardi simple ne povas. Male, artefarta intelekto ankaŭ povas analizi videojn de multaj da kameroj.

Unesko-Kuriero • julio-septembro 2018 | 25

Danke al la klopodoj de la nelacigebla ĉina samideano Trezoro, helpata de teamo da kunlaborantoj, daŭras la eldonado de **Unesko-Kuriero** en Esperanto. Legu en la 64a paĝo prezenton de la plej freŝa **Kuriero** kaj, se tio vekos vian intereson, senpage elŝutu ĝin en la retejo de Unesko.

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2018

Branĉo POEZIO

Unua premio ne aljuĝita.

Dua premio ne aljuĝita.

Tria premio ne aljuĝita.

Honoraj mencioj: Aleksandro Mitin el Rusio pro “Neĝo”, Piero Lupo el Italio pro “Suito”, Nicola Ruggiero el Italio pro “Via silento”.

Branĉo PROZO

Unua premio: Laure Patas d'Illiers el Francio pro “Fermita pro aflikto”.

Dua premio: Paulo Sérgio Viana el Brazilo pro “Paperfolio”.

Tria premio: Ewa Grochowska el Francio pro “Nesto de fenikso”.

Subbranĉo MIKRONOVELO

Unua premio: Laure Patas d'Illiers el Francio pro “Homlupo”.

Honoraj mencioj: Tatjana Auderskaja el Ukrainio pro “La bela rozo”, Gonçalo Neves el Portugalio pro “En Lisbono”, Paulo Sérgio Viana el Brazilo pro “Magia penso”, Ewa Grochowska el Francio pro “Postkuro”.

Branĉo TEATRAĴO

Unua premio ne aljuĝita.

Dua premio ne aljuĝita.

Tria premio: José Eduardo Rosa Crispim el Portugalio pro “Pantografo”.

Subbranĉo MONOLOGO KAJ SKEĈO

Unua premio: Laure Patas d'Illiers el Francio pro “Servi vin”.

Honoraj mencioj: Laure Patas d'Illiers el Francio pro “Bonvenon”, Valentin Melnikov el Rusio pro “Ne juĝu”.

Branĉo ESEO

Unua premio – premio Luigi Minnaja: Gonçalo Neves el Portugalio pro “En la mondon venis parol’ nova”.

Dua premio ne aljuĝita.

Tria premio ne aljuĝita.

Honoraj mencioj: Amri Wandel el Israelo pro “La homo kiu komprenis la universan lingvon”, Zdravko Seleš el Kroatio pro “La rolo de Esperanto en la obskura 20a jarcento”.

INFANLIBRO DE LA JARO


La premion gajnis, en egaleco la eldonejo Esperanto-Asocio de San-Paŭlo el Brazilo pro “La malbeno de Tarumo kaj Nurana” kaj la eldonejo Dokumenta Esperanto-Centro el Kroatio pro “Tikiriki Tok el Strobilo”.

Miguel Gutiérrez Adúriz

Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA

Brulvunde

Camacho, Jorge. *Brulvunde* / Postparolo de Nicola Ruggiero. – Partizánske: Espero, 2017. – 155 p.



Jorge Camacho nialingve estas tre speciala aŭtoro, iasence unikaĵulo, se tiel eblas diri: poemojn ŝajne li elkraĉas kiel aliaj retmesaĝajn leterojn. *Brulvunde* enhavas poemetojn el 2016 kaj 2017.

Kiel kutime, li montras sin tre lerta aŭtoro. Entute ne eblas doni impresojn de ĉio enlibra. Persone min trafas, sed tion certe Jorge Camacho memoros, ke la enhavataj poemetoj grandskale estas similformaj, male ol en mia propra verkado mi kutimas. Sed siastile nepre li sin montras bona majstro.

Nur kelkajn elektitajn poemojn speciale mi tuŝos. Por komenci mi nepre ne povas neglekti la temon, kiun tradicie li traktas:

Ekzemple, Carlo Minnaja (p. 9-15). Libro, en kiu Jorge Camacho silente preterirus kolegon Minnaja, impresus vere apokrifa: jam delonge ilia intermalamikiĝo fariĝis konata temo en nia literaturo. Persone tion mi bedaŭras, sed mi ja estas alia homtipo. Ĉi-libre tuta serio pompe reprezentas tiun temon.

Unu el la poemoj de la serieto speciale tiris mian atenton: *La merdulo absoluta*, ĉe kiu longa poetikaĵo mia asociacio estis Mezepoka Latina satiro, kiun ĉi tie bele simbolus la nupto inter Sara kaj Francesco: interese estas por mi, ke li interalie tuŝas al la proponata redaktado de nova aldono al [aŭ anstataŭigo de la] fame konata *Esperanta Antologio*. La du kontraŭuloj – JC&CM – do kune redaktu la novan eldonon; – ke ĉi-poeme Jorge reagis kolere kaj nee, ne estas mirinde. Mi povas bone imagi la scenon okazanta antaŭ miaj okuloj. Persone mi treege scivolas, ĉu la sugesto pri nova *Esperanta Antologio* estas serioza, kaj se jes, mi sincere esperas, ke ĝin redaktos iu alia kun minimume la plena kaj larĝa rigardo de William Auld. Per sia *Historio de la esperanta literaturo* Carlo Minnaja kun sia kunaŭtoro miaopinie neniel montris sin inda kandidato tiutasko. Mi scivolas, kiun oni eventuale elektus por la tasko.

Ne aparte (p. 18). Sufiĉe pesimisma pri la sorto de nia lingvo – aŭ ĉu pri la sorto de nia tuta homaro?

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa poskongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nia diligenta kolegaro

La malvarmaj tagoj pludaŭras: ĉi-matene mi ne havis varman akvon por min razi. Mia filo rapide senglaciigis la tubojn trafitaĵajn de frosto. Dum li laboris sub mia banĉambro, mi devis resti proksima de la malfermitaj kranioj de la lavabo kaj de la bankuvo por krie saluti la revenon de la varma akvo. La akvo ekfluis, mi kriis mian ĝojon kaj Edgar min aŭdis. Mi eluzis la tempon de la senglaciigo de la tuboj nombrante la mortintojn inter la ducentopo elmetita de *Nia diligenta kolegaro*¹, enciklopedio ĵus publikigita de *Sezonoj*. Mi nombris 124 mortintojn. Restas do 76 vivantoj [Reale estas 146 forpasintoj kaj 54 vivantoj. – La red.]. El tiuj ĉi 29 estas pli ol 70-jaraj. Niaj «diligentaj kolegoj», kiuj eble atingos la jaron 2050, estas nur kvindeko.

Vendrede, en la Esperanto-klubo, ni estis okope: 3 progresantoj kaj 5 flue parolantaj esperantistoj kun almenaŭ 30 jaroj da esperantisteco malantaŭ iliaj dorsoj. Paŭlo – Ĉe-instruisto diplomita, akirinto de C1-nivela ekzameno en Esperanto – volis prezenti *Nia diligenta kolegaro*-on al niaj progresantoj kiel temon de sia Ĉe-leciono. Post tiu ĉi la libro devis esti la diskuttemo de la kunveno. Paŭlo do komencis metante la libron antaŭ Yanon:

- Yano, kio estas tio?
- Tio estas libro.
- Ĉu vi povas legi la titolon de la libro?
- Jes: Nia diligenta kolegaro.
- Ĵan-Miŝelo, ĉu vi scias kion signifas la vorto: «aludi»?
- Jes, ĝi signifas «faire allusion»².
- Kion aludas la titolo de la libro?
- Mi ne scias.
- Ĝi aludas la himnon de Esperanto.

Yano estis surprizita; ankaŭ li ne sciis, ke Esperanto, kvazaŭ nacio, havas eĉ himnon. Dum la diskutado pri la iom trivita temo, la libro pasis el mano en manon. La aspekton de la libro ĉiuj juĝis bela, sed neniuj kapablis kanti *La Espero*-on. Helpante unu la alian ni tamen sukcesis restarigi la lastan duonstrofon:

*Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektivigis.*

Fredo – kiu videble decidis, ke la Ĉe-leciono estas finita – levis la montrofingron, atendis la silenton kaj metis la demandon: «Kion precize signifas la adjektivo «diligenta»?».



Mi havis PIV-on ĉemane kaj legis:

«***diligent/a.** Konstante kaj zorge laborema, penema: *diligenta lernanto; homo diligenta havas riĉecon^x; diligenta pri io; nia diligenta kolegaro en laboro paca ne laciĝos^z; ...*»,

Fredo daŭrigis: «La Esperanto-Movado ne povus funkcii danke al nur 76 vivantaj diligentuloj. Ekzistas almenaŭ 6000 homoj en la mondo kiuj estas diligentaj esperantistoj. Aliflanke, kiel mortintaj homoj povus esti «diligentaj». La titolo de tiu ĉi libro estas kortuŝa, sed misgvida. Ne sufiĉas esti «diligenta» kolego por enesti la libron, oni devas esti ankaŭ tre konata. Sed ne nur tiuj, kiuj scias sin reklami, apartenas al «nia diligenta kolegaro». Mi volus koni la kriteriojn laŭ kiuj la aŭtoroj elektis la famulojn – dutrione jam mortintajn – kiuj indas pavi en nia ducentopa diligenta kolegaro».

Mi, modesta pavanto, devis interveni: «Tion ja ili diras en la Antaŭparolo.» Mi prenis la libron, trovis la alineon kaj laŭtlegis:

«ni konsentis nek kun paroĥismaj ideoj «eternigi nian karmemoran klubestron», nek kun “reprezenta principo”, laŭ kiu ĉiu lando havu en la libro almenaŭ unu sian anon. Ni ne cedis ankaŭ al la argumentoj de la «politika ĝusteco», pledintaj por pli da virinoj, junuloj, afrikanoj k. s. La ĉefa kriterio estis kaj restis nur la graveco de la kontribuo de ĉiu konkreta persono, sendepende de ties nacia kaj seksa apartenoj. Pro tio en NDK³ plej multas eŭropaj viroj, kiuj dum la unua jarcento de Esperanto disvastigis la lingvon kaj riĉigis ties aplikadon en diversaj sferoj de la homa vivo.

Fine, estis verkitaj 231 biografioj, kaj ni jam pensis pri 250, sed post konsultoj kun Detlev Blanke, kiu ĝis sia neatendita morto kuratoris nian projekton flanke de CED⁴, ni decidis redukti la nombron al 200. Ĉirkaŭ dek artikoloj, malgraŭ persista serĉado, malhavis esencajn biografiajn faktojn, kaj pro tio ni devis forigi la tekstojn pri, interalie, Veselin Damjanov kaj Paul Hübner. Ĉe plia reduktado rimarkinde perdis, interalie, Francio kaj Hungario, kiuj ankaŭ post tiu reduktado estas plu elstare reprezentitaj en NDK.» (p. 4)

Mi elprofitis la silenton kaj levante la montrofingron, akcentante ĉiujn vortojn, malrapide por ke ankaŭ la progresantoj komprenu, mi relegis la esencan frazon:

«La ĉefa kriterio estis kaj restis nur la graveco de la kontribuo de ĉiu konkreta persono, sendepende de ties nacia kaj seksa apartenoj.»

Mi aldonis: «Ne forgesu tamen la subtitolon: *Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj.*»

Fredo plu grumblis: «Mi ne forgesas ĝin, ĉar ĝi estas la vera titolo de la libro. Por mi nia diligenta kolegaro estas la miloj da honestaj esperantistoj vivantaj kaj dediĉantaj sian libertempon al Esperanto. Sen ili tute ne ekzistus «eminentaj esperantistoj». Iliajn biografiojn mi volus legi.»

Eriko intervenis kun sia kutima teknikista precizeco: «Tia libro ne estus eldonbla. En *Nia diligenta kolegaro* estas 302 paĝoj dediĉitaj al biografioj. La libro kiun vi revas havus almenaŭ 25-oble 302, tio estas 7550 paĝojn. Ĝi kostus ĉirkaŭ 750 eŭrojn. Kiu ĝin aĉetus? Kiel vi kunigus la informaĵojn? Kiel vi kontrolus ilian

verecon? La esperantologoj nur perdiĝus en la fatraso de 5000 biografioj, ĉar niaj 5000 kolegoj – eĉ se ili estas egale «diligentaj» – ne estas egale talentaj kaj ne atingis samajn rezultojn kiel la specimena 200-opo. Tiu ĉi libro ja estas utila nur tia kia ĝi estas. Ĝi ja estas modernigita formo de *Enciklopedio de Esperanto*, eldonita en 1933, kiu nun enhavas biografiojn nur de mortintoj. Mi admiras la sobran precizecon de la biografioj en *Nia diligenta kolegaro*. Tiu ĉi libro estas fidinda. Ĝi enhavas apendice 10 suplementojn inter kiuj mi notas la liston de OSIEK-premiitoj. Nur unu gravan mankon mi konstatas: ĝi ne havas laŭteman indekson. Se mi volus trovi tiujn eminentulojn, kiuj estis, aŭ estas, ekzemple, inĝenieroj, mi devus tralegi la tutan volumon. Same, se mi volus trovi la nomon de la aŭtoro de iu verkaĵo aŭ la fondinton de iu institucio.»

«Estus tro komplike kompili tiajn indeksojn», opiniis iu.

«Tute ne. Ekzistas nun tre efikaj komputilaj programoj por elfari tiaĵojn», venis la respondo. En *Historio de la esperanta literaturo* ekzistas indekso de temoj; ankaŭ en la eldono de 1979 de *Enciklopedio de Esperanto*. Miaopinie, ĉi tipaj libroj ne estas kompletaj sen indekso de temoj. Estus eĉ pli bone, ke aldone ekzistu indeksoj de geografiaj nomoj, de personoj, de verkotitoloj ktp.»

«Indeksoj do ne ekzistas en tiu ĉi eldono de *Nia diligenta kolegaro*; eble ili aperos en venontaj eldonoj», konstatis Fredo, «sed tio ĉi estas relative malgrava, ĉar la volumo ne estas tro granda; 300 paĝojn oni trafolumas rapide. La ĉefa valoro de la libro konsistas en la ĝusteco de la donitaĵoj enhavataj. Eriko, vi ĵus diris, ke la libro estas fidinda. Kiel vi povas certi pri tio?»

Eriko ekridis: «Nur per tre supraĵa kontrolado: mi demandis al Eŭgeno – kiu enestas la libron – ĉu liaj donitaĵoj estas ĝustaj. Li respondis jese kaj rakontis al mi kiel pedante Aleksander Korĵenkov kontroladis eĉ la plej etajn detalojn. Tion kion li faris por Eŭgeno, li certe faris por la 199 aliaj. Jes, mi fidas pri tiu libro.»

La kunveno finiĝis. Veturinte hejmen, en la aŭto, mi pensis pri la formika laboro de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov. Libro estas bona kiam ĝia enhavo bonas. La klubanoj fakte nenion riproĉis pri la enhavo, kiun ili apenaŭ konis. Nur pri la mankoj ili babilis. Ili ne povis konstati la admirindan unuecon donitan al la enciklopedieto per la sama strukturo de ĉiuj 200 artikoloj. Tia strukturo ebligas la pliriĉigon de ĉiu nova eldono. Iom post iom *Nia diligenta kolegaro* fariĝos la ĉiam ĝisdata *Enciklopedio de Esperanto*, pri kiu ni ĉiuj revadas.

Eugène de Zilah

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa poskongresa *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



SES laŭ sia titolo kaj esenco ja estas studado. Ekzemple, kadre de la Kuirarta festivalo en SES oni povis studi tre interesan trinkomanieron. (Foto: Peter Rybín).

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Kurso kadavreca

Diference de aliaj kursoj de *Transparent Language*, la kurso de Esperanto tamen ne havas vivan instruiston. (Libera Folio, <https://www.liberafolio.org/2018/07/03/bal-dau-dek-jaroj-da-angla-blogado-pri-esperanto>)

Ne instruo sangon soifanta...

Por sangumi novan sangon neeviteble ni devas instrui Esperanton rete kaj ĉeklase... (leejungkee, 2 jun 2018, <https://www.liberafolio.org/2018/05/28/kiel-junigi-la-movadon/#comment-2053>)

Por rubriko nekrologa

Mi ege bedaŭras, ke forpasos Liberan Folion s-ro Kalle Kniivila (László Molnár, <https://www.liberafolio.org/2018/07/27/kalle-kniivila-forlasos-liberan-folion/#comment-2188>)

Teksttorturo

Saluton! jen la teksto kiu prilaboris la dumkongresan laborgrupon ĉivespere. (<https://groups.google.com/forum/#!topic/tejo-komitato/MvHgk7Q4-cA>, 6 aŭg 2018; trovis Kalle Kniivilä)

Ekstermonde, aŭ: Temoj transcendaĵ

... instigi malferman kaj plurtendencan debaton ne nur pri la mondo, sed ankaŭ pri Esperantujo. (Intervjuo kun Bruĉjo Kasini // *Heroldo de Esperanto*, 2018, №3, p. 4)

Buljone klara

La uzo de tiu koncepto... estas supeflua (François Grin: *Fremdlingvo-instruado kiel publika politiko*, p. 100; https://lingvo.org/grin/raporto_grin_eo.pdf)

Felisoj por feliĉo

- Ĉu Esperanta porno ekzistas?
- Mi havas linkojn! (<https://www.facebook.com/groups/esperanto.grupo/permalink/10156294990255289>; trovis Kalle Kniivilä)

Eksprese al la truo

“Esperanto Kiel Propedeŭtiko Al Rapidigo de Orientlingvo-Lernado kaj Intruado” (Cyril Brosch & Sabine Fiedler: *Der spezifische Beitrag des Esperanto zum propädeutischen Effekt...*, p. 17; http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2017/JGI2017-brosch_fiedler.pdf; trovis Lu Wunsch)

Kredkaoso en Turkio

Mustafa Kemal... malpermesis la religiajn ordojn... (Ĵak Le Puil: *La Kuracoservo // La Kancerkliniko*, 2018, №166, p. 4)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnický@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japania Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarete 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-USA, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!